Estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo

ĵaŭdon la 24-an de majo 2018 per Skype

Partoprenantoj:

Mario Machlik en Tromsø
Ulf Lunde en Os
Anne Karin Bondhus en Bryne
Amelie Matt en Tromsø
Jardar E. Abrahamsen en Trondheim

0. Tagordo

Aprobita.

1. Aprobo de la protokolo de la pasinta interkonsiliĝo (2018-04-26)

Aprobita.

2. Ekonomio

Skagen vekst 62 713 kr (60 789 kr).
Skagen Høyrente 132 857 kr (132 709 kr).

3. Jarraporto, jarkalkulo 2017

La estraro redaktis jarraporton laŭ sia kapablo, sed daŭre devas atendi kelkajn informojn kiujn ni ankoraŭ ne havas.

Ankaŭ la jarkalkulo ankoraŭ ne pretas.

Ambaŭ devus esti pretaj por aprobado antaŭ la venonta interkonsiliĝo, en aŭgusto.

4. Skandinava kongreso, seminario

Kvankam mankis iom da "tutkomuna tempo", estis agrabla kaj sukcesa aranĝo sur ŝipo, kun ekskursoj kaj en Oslo kaj Kopenhago.

En Oslo partoprenis la ekskurson kelkaj NEL-anoj kiuj ne partoprenis en la ŝipvojaĝo. La vicurbestrino de Oslo akceptis viziton de la kongreso kun ĉiĉeronado en la urbodomo (eĉ en koridoroj kie turistoj kutime ne havas aliron). Oni donis al ŝi broŝuron pri Esperanto.

NEL estas la sola inter la skandinavaj organizoj, kiu posedas propran ejon (Esperantonia). Tio estas valora posedaĵo, pro kiu la aliaj envias nin. Ni neniam vendu ĝin!

En Kopenhago oni ekskursis en bonega vetero. Inter alie oni tie vizitis tombejon kie estas

entombigita Margrethe Noll (1874-1962), patrino de la dana Esperantomovado. Oni ankaŭ lernis, ke Zamenhof vizitis la urbon en 1908.

Dum la ŝipvojaĝo Herman Ranes montris lumbildoj de la UK en Seulo, Otto Prytz faris prelegon pri Johan Falkberget, kaj Mario Machlik montris lum- bildojn de sia japana vojaĝo. En tiu seminario partoprenis ok norvegoj kaj sep svedoj.

La estraro proponas, ke ni kalkulu tion kiel la ĉi-jaran NEL-seminarion kaj ne klopodu aranĝi kroman seminarion en 2018.

5. Komitatano A de UEA

Herman Ranes diris ne, sed Kjell Peder Hoff akceptis la nomumon.
Do la estraro elektas Kjell Peder Hoff kiel Komitatanon A.

6. Eventualaĵoj

Nenio.

La interkonsiliĝo daŭris de 20.00 h ĝis 21.10 h.

La venonta interkonsiliĝo: la 23an de aŭgusto je 20.00 h

Raportis Ulf Lunde.